# LA FERVOJISTO

ITALA FERVOJISTA ESPERANTISTA ASOCIO — A. I. F. E.

ASSOCIAZIONE ITALIANA FERROVIERI ESPERANTISTI
Dopolavoro Ferroviario - Via XX Settembre 17
VERONA (Italia)

INFORMA BULTENO

N.7 - 1952

## AL ĈIUJ ITALAJ ESPERANTAJ KOLEGOJ

Post unu jaro el la III.a Pariza IFEF-Kongreso hodiaŭ ni trovas nin je la antaŭtago de la IV.a Lindaŭa IFEF - Kongreson.

La Loka Kongreskomitato klopodis organizi kongreson tiel, ke ĝi realizu belege la du fundamentajn normalajn punktojn de ĉiuj kongresoj: konkreta laborprogramo por la disvastiĝo de nia movado aŭ en profundeco aŭ en etendo; ebleco por la partoprenantoj pasigi la kongrestagojn ankaŭ laŭ belega amusprogramo.

Mi estas certa ke: la urbo elektita kiel kongressidejo; la nombro de la partoprenantoj; la graveco de la pritraktontaj temoj kaj fine la harmonio, kiu karakterizas normale, niajn kongresojn, tiuj ĉi elementoj ĉiuj sendube garantios la sukcesplenecon de nia Kongreso.

Italio, tre juna landa rondo, kiu nur el mallonga tempo eniris la IFEF -Familio, intencas partopreni la IV.an IFEF-Kongreson per multnombra delegitaro, tiel plenumante la promeson faritan lastjare en Parizo okaze de la III.a IFEF-Kongreso.

A.I.F.E. - Asocianoj estas do petataj iĝi tiel, ke ili povu certigi ilian partoprenon.

LA PREZIDANTO
(D.ro MARIO SPADAFORA)

================================================================================

## 1) - SUR LA VOJO DE LA PROGRESO

Same kiel ni jam previdis, la XXIII.a Pisa FEI-Kongreso,- kiu okazis dum la monato de Septembro pasintjare - konsistigis forirpunkton por la Italia Esperanta Movado.

Fakte, ni hodiaŭ rimarkas la unuajn praktikajn rezultojn, kiuj estas la necesaj premisoj por ĝia pli granda disvastiĝo.

Jam en diversaj Italiaj urboj en tiu ĉi momento disvolviĝas aŭ estas en preparado kursoj de Esperanta Lingvo, plifaciligitaj de S.E. la ministro por la Publika Instuado, pere de partikulaj koncesioj, ekzemple: konsento utiligi lernejĉambrojn en la diversaj Institutoj, ne nur, sed ni sciiĝis ankaŭ ke baldaŭ oni devus organizi kursojn por la preparado de instruistoj de Esperanta Lingvo.

Tio devus komprenigi al ĉiuj la instruistoj aŭ de la primariaj aŭ de la sekundariaj skoloj, la necesecon por ili apliki sin lerni tiun ĉi neŭtralan helplingvon, ne nur por ridigi sian kulturon, sed ankaŭ por pretigi sin al la instruado, kiam, je ne malproksima tago

leĝdispono fiksigos devigan instruadon de tiu ĉi helplingvo en la primariaj kaj en la sekundariaj skoloj.

Do, ni deziras al ni vidi ke la proksimaj kursoj estas vizitadaj flanke de multaj instruistoj, kaj ni estos ankaŭ certaj ke, tuj ke ili kontaktiĝos kun Esperanto, ili forlasos tiun "mizoneistikan" malfidsencon - kiu estas ne nur en ili, sed ankaŭ en la grandega plejmulto de personoj de ĉia kategorio - por saluti entuziasme tiun novan faĉilan komprenilon inter la homoj de ĉiuj landoj, kiu ne mankas al porti bonajn fruktojn en la rilatoj nur inter la homoj, sed ankaŭ inter la diverslingvaj popoloj.

La PISA Kongreso konsistigis forirpunktojn ankaŭ por la Esperanta Fervojista Movado. Efektive, la A. I. F. E.-Asocianoj kunvenis la saman tagon de la solena malfermo de F.E.I.- kongreso, posttagmeze,kaj pere de kelkaj provisoraj decidoj oni sukcesis doni visaĝon kaj karakteron al nia Organizo, kiu iĝos definitiva al nia II.a Nacia Kongreso.

Tiu ĉi diskutados kaj decidos pri la sekvenda vojo kaj pri la elekto de la nova AIFE. -Estraro.

Sendube multe da laboro estos por la Esperantaj Fervojistoj dum la tempo kiu mankos por alveni al la Bologna-Kongreso.

Dume, la 27.an de Aprilo 1952 okazos la Bologna-Kunvenon, kiu devos doni ankaŭ direkton al la nuna AIFE.-Estraro.

Je la fino de Majo okazos poste en Lindaŭ (Kostanca Lago - Germanio) la IV.an IFEF.-Kongreson, al kiu ni devos ĉeesti multnombre, ankaŭ por konstati la konstantan gravecon ke niaj internaciaj kongresoj akiras kaj sekve por tie absorbi la spiriton de frata solidareco, kaj disvastigi ĝin inter niaj amikoj kaj kolegoj.

Multe da laboro estos, kiu atendas disvolviĝi, por doni vivon al novaj grupoj, krei memstarajn asocianoj, kiuj estos nature nukleoj ĉirkaŭ kiuj novaj grupoj naskiĝos, plie multe da laboro estos disvolviĝi cele krei tiun klimaton, kiu finfine devos fleksigi nian Fervojan Administracion doni oficialan rekonecon al nia asocio, kio devos esti malproksima, se jam en nia nuna Registaro eniris la ideo helpi Esperantan Movadon; se jam nia Ministro por la Transportoj donis sian aliĝon partopreni la Honoran Komitaton de la XXIV.a FEI-Kongreso.

Tiun rekonecon devos ni mem akiri per nia ne lacigebla aktiveco, necesa por fortigi nian Asocion: A.I.F.E.

Tio estas fiksa najlo,kiu estas poste la celo de la laboro de la nuna "Direkta Komitato" , ĉar gi estas firme konvinkita ke per tiu rekoneco ni havos tujan kaj vastan disvastiĝon de nia Organizo.

La nuna "Direkta Komitato" celas ankaŭ demandi al la Lindaŭa Kongreso, ke la IV.a IFEF.-Kongreso, en 1954, okazos en Italio.

Ni opinias ke tiu demando estos akceptata ankaŭ de nia eksterlandaj gekolegoj, al kiuj estas presentonta bonan okazon viziti Italion ne nur, sed ankaŭ por ni Italaj Esperantaj Fervojistoj estos bona okazo pruvi nian organizan maturecon por propagandi nian movadon, kaj doni ĉiam pli grandan kontribuon al tiu ĉi movadon de kunigo inter la Fervojistoj de ĉiuj landoj.

Italiaj Esprantaj Fervojistoj, al la laboro, do, por realizi niajn aspirecojn.

==========================================================

## VERONA TEATRA SOMERO

La programo pri la Verona Lirika Teatra Somero estas konkretizita.
Ni eldonas ĝin:

SABATO la 19an Julio = LA GIOCONDA = DIMANĈO 20an Julio + BORIS GOD.
MERKREDO 23an " = LA GIOCONDA = SABATO 26an " = BORIS GOD.
DIMANĈO 27an " = LA TRAVIATA = MARDO 29an " = BORIS GOD.
ĴAŬDO 31an " = LA GIOCONDA = SABATO 2an Aŭgusto= LA TRAVIATA
DIMANĈO 3an Aŭgusto = LA GIOCONDA = MARDO 5an " = LA TRAVIATA
ĴAŬDO 7an " = LA GIOCONDA = SABATO 9an " = L'INCANTESIMO
CAVALLERIA RUSTICANA
GAIETE' PARISIENNE
DIMANĈO 3an Aŭgusto = LA TRAVIATA = MARDO 12an Aŭg. = L'INCANTESIMO
CAVALLERIA RUSTICANA
GAIETE' PARISIENNE
MERKREDO 13an Aŭgusto = IL LAGO dei CIGNI (Internacionala Baleto)
ĴAŬDO 14an " = LA TRAVIATA = VENDREDO 15an Aŭg.= L'INCANTESIMO
CAVALLERIA RUSTICANA
GAIETE' PARISIENNE
SABATO 16an Aŭgusto = LA BELLA ADDORMENTATA (Internacionala Baleto)
DIMANĈO 13an Aŭgusto = IL LAGO dei CIGNI (Internacionala Baleto)

Ni kompletigos la programon pri la Verona Proza Teatra Somero per nia Maja Bulteno.

==================================================================

## ANGLA SPIRITO

Estis vintro kaj un Anglo Vojaĝis per vagonaro tra regiona Montaro. Unue li envolviĝis ĝis la oreloj kaj poste malfermis la fenestron. La vojaĝantoj bruege protestis, elvenis la kontrolisto (konduktoro) plialtiĝis la vitron kaj poste reprenis sian laboron.

Post kelke da minutoj la Anglo frakasis la vitron per bato de sia bastonon dirante: mi pagos kiom necesos, sed mi volas ĝin malfermita ĉar mi ŝatas vidi panoramon.

## KOMUNIKATO

Nia Informa Bulteno N° 6 (Aprilo 1952a) naskiĝis sub malbona stelo. Nia maŝin=skribisto faris multajn erarojn. Eble li sentis la printempon kaj por tio, laboris malatente.

Plie, li laboris kiel li povis dum mallonga tempo kiu al li restas post sia fervoja laboro, kaj por tio ni vin petas pardoni nin, same kiel ni pardonas lin.

## MOTO

SAMIDEANOJ: Daŭrigu vian batalon ĉar la najlo ne eniras ligno
per unu sola frapo.

^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^^

## DANKO

Dum la monato de Februaro 1952 ni skribis al la diversaj Esperantaj Fervojistaj Landaj Rondoj kun la celo ricevi informojn pri siaj rilatoj kun la respektivaj Fervojaj Administracioj.

Ni dankas ĉi-pere la Estrarojn de la Landaj Rondoj, kiuj respondis al ni, ĝis nun Finlando - Danio - Svedio - Norvegio - Nederlando - Svislando kaj Aŭstrio.

==========================================================================

## IMPORTA INFORMO

Por niaj eksterlandaj gekolegoj, ni tradukas circuleron kiun nia Ministro por la Publika Instruado, sendis al Provincaj Studestroj pri la instruado de la Esperanta Lingvo en Italiaj Lernejoj:

Roma, la 21an de Februaro 1952

Prot. N° 12411, Gab.

Koncernas: Esperantaj kursoj

Al la Studestroj,

tiu ĉi Ministrejo, kumprenante la utilecon kaj intereson, kiuj povas deveni de la sciado kaj disvastigo de Esperanto, opinias ke la studado de tiu ĉi lingvo devas esti favorita en tiuj centroj, almenaŭ kie troviĝis elementoj kapablaj instrui tiujn lingvon.

Tiel, celante faciligi la sciadon de tiu helplingvo, tiu ĉi Ministrejo havas nenion kontraŭe por ke oni favoru iniciatojn celantojn promovi la studadon de Esperanto per la concesioj, ankaŭ, de la usado de lernejĉambroj por la fondo de kurso.

Okaze, oni sciigas ke pri la teknikaj instruoprocedoj, la skolaj estroj povos preni oportunajn kontaktojn kun la “ Italia Esperanta Istituto - Firenze - Via de’ Neri 6, aŭ kun La lokaj reprezentantoj de tiu studcentro.

La studestroj estas petita bonvolu sciigi tiun ĉi Ministrejo - ĝustatempe - pri la sukceso kiun la diritaj kursoj atingis.

La Ministro
S.to SEGNI

==========================================================================

## ROMA RADIO

### Programo en la Esperanta Lingvo

Ni sciigas niajn samideanoj, italaj kaj eksterlandaj, ke la Roma Radiostacio trasmisas programon en la esperanta lingvo; jen la tagoj kaj la horoj de la trasmisioj rilate la monato de Majo 1952:

Vendredo la 2an - Merkredo la 7an - Vendredo la 9an - Merkredo la I4an - Vendredo la I6an - Merkredo la 21an - Vendredo la 23an - Merkredo la 28an - Vendredo la 30an.

Horo de trasmisioj: de horo I8.30 ĝis horo 18.50

Stacioj (mallongaj ondoj ) metroj 25.21 = Kc/a 11.900<br>
“ 31.35 = “ 9.570<br>
" 49.92 = “ 6.010

Prelegistoj: Prof. Ascenzio, BLASIMME kaj Prof. Vincenzo MUSELLA

Adreso: Radio Roma = Esperanto = Via Veneto 56 = ROMA ( I t a l i o )